

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 4/1988

septembro 1988

L. Křesinová

Somera Esperanto-Tendaro 1988

Kiam ni proksimiĝas al Lančov tra Vranov, jam ĉe eniro al Vranov katenas atenton de ĉiuj vizitantoj la dominanta de Vranov-kastelo fiere altiĝanta super profunda valo. Ĉi tiu juvelo de la baroka arkitekturo, konstruita sur la loko de la iama kastelo, fondita de princo Vratislav, kaj kiu dum la tridekjara milito post ruinigo fare de svedoj forbrulis, estis rekonstruita laŭ plano de la glora aŭstria konstruisto Johano Fischer el Erlach. Poste ĝi estis kelkfoje riparita kaj kompletigita per diversaj riĉaj kolektoj. Veturante tra longaj arbaroj ni ekvidos la belegajn arbarscenojn kaj ni rapide proksimiĝas al Lančov.

En la Arĝenta golfo ĉe la vilaĝo Lančov, proksimume 3 km de baraĵo jam 30 jarojn ekzistas Somera Esperanto-Tendaro, en kiu oni instruas Esperanton. La tendaron vizitis dum tiu tempo jam multaj miloj da esperantistoj preskaŭ el la tuta mondo. La tendaro okazas ĉiam dum julio kaj aŭgusto en tri dekkvartagaj etapoj. Diversgradaj Esperanto-kursoj arigas la lernantojn ĉiutage matene, escepte de dimanĉoj. Posttagmeze la programo konsistas el sportoj, naĝado, ŝipado, ĉar la tendaro pesedas kelkajn ŝipetojn. Se ni decidiĝos navigi per vaporŝipo 25 km, ekkaptos nian atentemon ne nur la naturbelaĵoj, sed ankaŭ la estinta limgardanto de Suda Moravio – burgo Bítov, konstruita jam en la 11-a jarcento. Kontraŭo de Bítov-burgo estas ruino de Corštýn, konstruita en la 13-a-14-a jarcentoj.

Dum la lastaj 30 jaroj la vizitantoj el la tuta mondo kreis internacian lingvan etoson. Ĉi-jare partoprenis:

en la unua etapo: 180 partoprenantoj, la lastajn kvar tagojn 205 partoprenantoj, ĉar 25 bulgaraj gekursanoj alveturis antaŭtempe. Entute estis 11 kursoj, la "C"-kurson instruistan tre sukcese gvidis s-anino D-rino Pavla Jodasová. Eksterlandaj partoprenantoj estis el Bulgarujo, Sovetunio, Germana DR, Nederlando.

La 2-a etapo: 168 partoprenantoj, entute estis 9 kursoj, "C+D" kurson gvidis s-ano prof. D-ro Rudolf Horský. Eksterlandaj partoprenantoj estis el Bulgarujo, Sovetunio, Germana DR, Hungarujo.

La 3-a etapo: 139 partoprenantoj, entute estis 7 kursoj. "C+D" gvidis s-ano Ing. Karel Janouš. Eksterlandaj partoprenantoj estis el Bulgarujo, Germana DR, Kamerunio, Angolo, Jugoslavio.

Je la 6-a horo kaj 30 minutoj estis vekiĝo. Eksonis fajfado kaj la konata kanto: "Vekiĝu, ho dormantoj..." Ni tuj gimnastikis kaj poste matenmanĝis. Je la 8-a horo komenciĝis la instruado – du instruhoroj, poste lunĉo, pluaj du instruhoroj kaj la kvina horo estis kantado. Sekvis tagmanĝo kaj poste amuzo, sporto, laŭ ĉies elekto.

Je la 18-a horo estis vespermanĝo, je la 19-a "la viciĝo". Ni ĉirkaŭis la maston kun alte flirtantaj flagoj. En la frunto de la viciĝo staris la tendarestro kaj la tagestro (por ĉiu tago estis elektita alia tendarano) ordonis:

Tendaranoj, atentu!

La tendarestro s-ano Pavel Sittauer tra legis la enkondukon de ordono.

Tendaranoj, ripozu!

Daŭris legado de la ordono. La legado estis finlegita kaj eksonis novaj ordonoj.

Tendaranoj, atentu!

Flagtaĉmento, marŝu ek!

Tendaranoj, al la flagoj rigardu!
Flagtaĉmento, la flagojn malhisu!
Dum la malhisado ni kantis la konatan kanton: "Per molaj paŝoj venas..."
Kaj pluaj ordonoj:
Flagtaĉmento, marŝu for!
Tendaranoj, rigardu rekten!
Al la hodiaŭa tago trifoje hura!
Super la tuta tendarplaco sonis: hura, hura, hura!
Disiru!
La viciĝo finiĝis kaj ĉiu tendarano konis la programon por morgaŭo.

Vesperojn ni ĝuis ofte ĉe la tendarfajro, kie ni amuziĝis laŭ la programo. La flamoj de la tendarfajro altiĝis kaj briligis la ĉirkaŭajn arbojn kaj siluetojn de la ĉirkaŭsidantoj. Dum la kantado kaj amuzo la fajreroj ŝvebis tra la arbarkronoj al la nokta, stelriĉa firmamento. La partoprenantoj de ĉiu nacio prezentis sian nacian vesperon. Se pluvis, ĉiuj programoj estis okazigitaj en la manĝejo, same kiel disko-dancado, lumbildoj, ekspozicietoj, prelegoj kaj aliaj kulturaj programoj. En ĉiu kurso estis okazigita tuttaga ekskurso por trarigardi la ĉirkaŭajn kulturajn memoraĵojn.

La fino de nia kurso proksimiĝis kaj ĉiu el ni estis ekzamenita – perbuŝe kaj ankaŭ skribe. Dum la lasta vesperordono ĉiu ricevis la ateston laŭ sia merito kaj ni ĉiuj adiaŭis kun la novaj amikoj, bela medio de la tendaro, tendarfajroj, bona kaj abunda manĝaĵo, bonaj kaj zorgemaj tendarestroj. Kiam poste je fino de tago ni eksidis antaŭ la kabaneto kaj aŭskultis mallaŭtan melodion de nokto, ni eksopiris denove reveni al la lokoj tiom malproksimaj de la rapidema ritmo de la moderna civilizacio.

Esperanto-klubo en Třebíč ĉi-jare jam 36 jarojn zorgas sukcese pri Somera Esperanto-Tendaro, sed la 5-an de aŭgusto 1988 festis la tendaro jam la 30-jaran datrevenon de la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov ĉe la Arĝenta golfo.

Dankon al ĉiuj anoj de E-klubo en Třebíč por multaj amikecoj inter la homoj, por la disvastigado kaj la perfektigado de la Esperanto-movado.

*

Le' Psiko

HUNDA VIVO

Pudelo kaj vulpoteriero renkontiĝis en vasta parko. Ili promeniĝis siajn mastrojn, ĉiutage. Dume la mastroj sidis surbenke sub alta kverko, la hundoj havis okazon interparoli.

"Nu", la blanka pudelo - ekkomencis. "Vi, ŝajnas, sukcesis movigi vian homon eksteren. Ĉu via dupiedulo ankoraŭ ĉiam kredas, ke li estas la ĉefo via?"

La vulpoteriero svingis sian voston: "Oni ja devas posedí paciencon pri tiuj granduloj. Ĝis la mia sufiĉe obeis estis longa eduka vojo, vere. Sed nun mi nur diras, vuf, kaj li jam komprenas, ke mi volas surstraten, enparken. Tiuj estaĵoj ja estas tiom stultaj, nekredeble! Eĉ nian lingvon ili ne tute komprenas. Mi do prononcas klare, ĉu?"

"Vere, vi bone prononcas!" la pudelo konstatis. "Ili ja eĉ ne komprenas unu la alian! Ĉu vi scias tion? Ne? Estas tiel! Ni hundoj tutmonde komprenas niajn gefratojn, ne gravas, ĉu vertago, pudelo, ŝpico, teriero... vere ne. Unu komprenas la alian. Ne ĉe tiuj dupieduloj! Ekzistas blankaj, brunaj, flavaj, nigraj, ruĝaj ... sed ne havas komunan lingvon!"

"Interese! Mi ne sciis tion ĝis nun. Ĉiam mi rimarkas, ke homoj estas idiotoj, ĉu? Ĉar ili metas nin en kolringon kaj kondukas nin per rimeno, ili jam kredas, ke ili promeniĝas nin, ha? Mi devas ridi! Kiu finfine direktas ilin en parkon? Ni! Ne male! Ili ja nur sekvas nin, ĉu ne?"

"Pravege! Mi nur permesas tiujn kolringon kaj rimenon, por ke mia homo ne miskuru. Li tre volonte irus al tiu loko, kie oni disdonas tiun trinkaĵon... nu, kiel nomiĝas... helpu al mi!"

"Ĉu" temas pri biero?", la vulpoteriero demandis.

"Jes, ja, biero! Do lia ĉefino petis min, ke mi estu atentema. Afabla persono, tiu ĉi homino. Tial mi ĉiam kondukas lin en parkon..."

"Efektive, homoj estas kompatindaj estaĵoj! Ne komunan lingvon, ne propran volon... ne laŭvole trinki bieron... senutilaj vivaĵoj!"

"Senutilaj mi ne dirus. Kiel servantoj ili bone funkcias – oni nur pacience devas eduki ilin. Daŭras unu, du jarojn – tiam ili agas laŭ via volo. Unu sono devas sufiĉi – kaj ili servas al vi. Ili eĉ ne rimarkas tion. Senutilaj, ne! Iomete stultaj, jes!"

"Nu, mi kredas, ke estas tempo por iri hejmen. Vidu, mi nun demonstras al vi mian ĝisnunan sukcesplenan eduklaboron, vidu..." La teriero tiris la hundorimenon antaŭen kaj ekbojis dufoje. Ĝia mastro ekstaris, adiaŭis kaj ekiris hejmen.

"Bone dresite", la pudelo murmuris. "Por la komenco jam tre bone!"

(El la libro HUNDA VIVO de Le'Psiko
/Esperanto - Eldonejo Leipzig/ elektis Ves.)

Jaroslav Hašek

Interparolo kun malgranda Miĉjo

Mi sidas jam kvar monatojn en juĝaresto kaj ankoraŭ mi ne konfesis, kion mi faris kun mia malgranda nevo - kvarjara Miĉjo Klogner.

Mi timas, ke se mi dirus, kie mi lasis lin, mi ne plu liberiĝus de li, post kiam oni trovas lin. Mi scias, ke liaj unuaj vortoj estus: "Kial vi ĉi tie sidas?" Tiu lia malfeliĉa: "Kial?"

Antaŭ pli ol kvar monatoj promesis al Miĉjo liaj gepatroj, ke lia onklo, nome mi, iros kun li promeni. Vole nevole mi devis iri kun li, promesinte al la malfeliĉaj gepatroj, ke la saĝan knabeton mi bonorde alkondukos reen.

Tial mi tuj diris al li, kiam ni eliris el la domo:

"Tenu mian manon, por ke nenio okazu al vi" "Kial nenio okazu al mi?" kun tiu ĉi demando tuj surprizis min la sagaca infano. "Sciu, Miĉjo, mi povus surveturi vin." "Kial oni surveturus ĝuste min, kial ili ne surveturos vin?" "Vi estas ancorau eta." "Kial mi estas eta?" "Ĉar vi estas nur kvarjara." "Kaj kial mi estas nur kvarjara?" "Ĉar vi ne estas kvinjara." "Kaj kio estus, se mi estus kvinjara?" "Tiam vi estus je unu jaro pli aĝa." "Kio estas pli aĝa?" "Vidu, jen tiu fraŭlino estas jam pli aĝa." "Kial vi diras, onklo, jen tiu?" "Ĉar, karuleto, ŝi ne estas tiu, kiu iras kontraŭe." "Kiele, tiu?" "Sciu, Miĉjo, silentu jam, bele." "Kial mi silentu bele?"

Mi kapofrapis lin.

La bubo ekploris kaj mi diris al li: "Do ne ploru plu." Li viŝis la okulojn per maniko kaj demandis min senkulpe: "Kial mi ne ploru?" "Ĉar vi estas viro." "Kaj kial mi estas viro?" "Ĉar vi ne estas knabineto." "Kial mi ne estas knabineto?" "Ĉar, kara infano, vi portas pantaloneton, cetere vi ekscios tion, kiam vi estos pli aĝa." "Ĉu ankaŭ vi portas pantalonon, onklo?" "Vi ja vidas tion, Miĉjo!" "Kial vi ne estas, oĉjo, ankaŭ knabeto, kiel mi?" "Ĉar mi jam elkreskis el tio." "Ĉu ankaŭ mi elkreskos tiel?" "Vi ankaŭ iel kreskos, sed nun jam tenu la buŝon." "Kial mi tenu la buŝon?" "Ĉar mi ĵetus vin en la riveron." "Sed tion mi ŝatus, oĉjo." Nun estis mia vico por demandi lin: "Kaj kial vi tion ŝatus, Miĉjo?" "Ĉar mi farus vaporŝipeton." "Kaj kiel vi farus vaporŝipeton?" "Mi blovspirus, oĉjo, kaj sur mi rampus homoj kaj ili sonorigus. Mi estus vaporŝipeto, 'Chuchle' kaj mi kraĉus fajron." Subite li turnis sian atenton al viro, kiu surŝprucigas la straton. "Kial tiu sinjoro surŝprucigas la straton?" "Ĉar li forfluigas polvon." "Kial li ne surŝprucigas nin?" "Ĉar tion li ne rajtas." "Kial li ne rajtas?" "Ĉar li difektus niajn vestojn." "Kial li difektus niajn vestojn?" "Per akvo, fileto." "Kaj kial per akvo?" "Ĉar li surŝprucigas per ĝi kaj ne per biero." "Kaj kial li ne surŝprucigas per biero?" "Ĉar li ebriiĝus." "Kaj kial li ebriiĝus, vi ankaŭ ebriiĝas, oĉjo, tion diras la panjo. Kial vi estas porko, oĉjo?" "Tion vi ne komprenas, Miĉjo, sed nun jam silentu, aŭ mi bategos vin." "Kaj kial vi bategos min?" "Ĉar vi insultas min." "Kial mi insultas vin, hejme oni ankaŭ insultas vin." "Sed tio ankaŭ ne estas bela de ili." "De vi tio ankaŭ ne estas bela, oĉjo."

Mi denove kapofrapis lin. Li eĉ ne palpebrumis kaj diris: "Ĉu ne, mi ne rajtas plori. Vi ankaŭ ne ploras, kiam la onklino batas vin. Kaj kial ŝi batas vin?" Mi puŝis lin en lian dorson. Li eksilentis kaj poste, kvazaŭ nenio okazis, li ekvokis: "Kial tiuj ĉi domoj ne havas malantaŭe pordojn, kial ili havas ilin ĝuste tie ĉi?" "Ĉar neniu povus eniri tien." "Kaj kial iu devus eniri tien?" "Ĉar li loĝas

tie." "Kaj kial li loĝas tie?" "Ĉar li devas." "Kaj kial li devas?" "Ĉar li ne volas dormi sur la strato." "Kaj kial li ne volas dormi sur la strato?" "Ĉar li estas serioza homo."

Li eksilentis kaj diris: "Sed vi, onklo, ĉi tie ne loĝas." Post tio sekvis tuta vico da demandoj: Kial arbon oni nomas arbo, kial la arbo havas branĉojn supren, ĉu el la arbo ne estus eble fari aervezikojn, kial aerveziko krevas, kial mi aspektas kiel aerveziko, kiam mi krevos (kion li sekvigis per peto, ke mi krevu post angulo).

Kiam ni ekvidis hundon, li demandis, kial ĝi ne estas kato (nova kapofrapo). Longa paŭzo, en lia kapo dume svarmis novaj demandoj. "Kial, oĉjo, el gardanĝelo oni ne faras globkukojn?" "Kial mi estas ŝvitkovrita?" "Kial, oĉjo, sentante varmegon, vi ne elŝovas langon, kiel hundo?" "Kial vi ne estas hundo kaj estas elefanto?" "Kial vi havas nazegon, oĉjo?"

Ni iris preter stacidomo. Mi diris al li malespere: "Ĉu vi ŝatus veturi en Hungarion?" "Kial mi ŝatus veturi en Hungarion, oĉjo?" "Ĉar mi aĉetos al vi bileton, kaj ni veturos bele kune; sciu, per lokomotivo." Li ekklakis per la manetoj kaj ekvokis: "Mi ankaŭ maŝinspiregos." "Nur spiregu, knabeto." "Mi ellasos vaporon." "Faru, kion vi volas, Miĉjo." Kaj mi aĉetis du biletojn al Puszta Magyarad, en direkto al Füzes-Gyarmat, al la lasta stacio meze de senmezura stepo. Mi rimarkigas, ke la sagaca infano konstante demandis: "Kiam ni jam estos surloke, kiam vi formetos min?"

Fine li ĝisatendis tion. Ni iris el stacio Puszta Magyarad en la stepon pli ol unu tagon kaj duonon kaj tie en la mezo mi diris al Miĉjo, ke li atendu min. "Kial mi atendu, oĉjo?" "Ĉar vi estas tia saĝuleto." Kaj mi rapide malproksimiĝis. Nur post mi mi aŭdis lian senkulpan voĉeton: "Kial vi forkuras, oĉjo?" kaj post momento: "Kial min, onklo, pikas formiketoj?"

Jen estis mia konfeso.

(Tradukis JP)

Por via sano
(Fino)

Preparas J. Ondráček

Vorto en libro (aŭ litero en la vorto) foje estas ankoraŭ pli konvena. Imagu ĝin tiel klare kaj nigre, kiel eblas, poste fermu la okulojn, "tenu" ĝian bildon antaŭ si kaj la okulojn remalfemu. Rigardu la vorton aŭ la literon; se ĝi ŝajnas al vi pli nigra ol pli frue, tio estas argumento, ke la vidkapablo pliboniĝas. Ripetu kelkfoje kaj poste daŭrigu per alia vorto aŭ litero.

Normalan praktikadon de tiu ĉi ekzercado sekvas konsiderinda plibonigado de la vidkapablo.

Forigo de okulmalsanetoj.

En kompleta kompendio oni priskribas forigon de okul-malsanoj kiel miopecon, malmiopecon, hipermetropecon, astigmatcon, presbiopecon, strabismcon. Homoj kun jenaj malfacilaĵoj aplikis en diversaj aranĝoj la ekzercojn, kiuj estas priskribitaj sur antaŭaj paĝoj. Krom tiu ekzercado oni ĉie akcentas malstreĉadon de la okuloj kaj ankaŭ kompleksan psikan senstreĉiĝon.

Grava parto de la kompendio rilatas malsanojn kiel katarakto, glaŭkomon, konjunktiviton, irisiton, korneiton ktp. La angla aŭtoro eksplikas, ke ĉion kaŭzas ne nur malordo en la okulo, sed ankaŭ malordo en la tuta korposistemo. Reduktita vitaleco kaj tokseco de la sangocirkulado kiel rezulto de malbona vivoreĝimo kaj de malbona vivo entute ĉiam estas la radiko de tiuj malsanoj. Nur natura kuracado kapablas forigi de la homo la malsanojn, per senutila kaj kontentiga maniero. Se la homo kun la okulmalsano akiras la konvinkigon, ke li devas rigardi sian tutan korpon kiel

(fino sur pĝ. 6)

Virino kun kofro

Mi vidas ŝin kaj pensas: Damo.
Ŝi iras supren al la tramo
numero dekkvin. Laŭ la modo
ŝi kombis al si noblan nodon - -
Mi ankaŭ estis kiel pupo;
mi ne rapidis en okupon,
ne devis kuri post la pano.
Mi vidas ŝin kaj pensas! Damo.

Damo. Ŝi bone edziniĝis.
(Kaj kiomfoje li feliĉis
havante tian en la lito?)
Mi ankaŭ vestis nur kvaliton.
Apud parulo kun titolo
ankaŭ mi ludis certan rolon.

Kaj al la homoj, ĝi sufiĉis:
Damo. Ŝi bone edziniĝis.
Domo kaj tamen servistino.
Kun strangaj sentoj en animo
mi sekvas ŝin kaj kofron sian.
Simile vivis eĉ mi iam.
Eĉ mi, regule tro kompleza,
portadis ilin, ofte pezajn!
Eĉ mi klopodis ĝis la fino:
Damo kaj tamen servistino.

Nimfoj

Miksita ŝvebas en kastelĝardeno
odoroj pezaj de jasmeno kaj rozoj
kaj jen dancante meze de bazeno
kliniĝas nimfoj en tre ĉarmaj pozoj.

Diskrete, ĉaste trema ondspegulo
redonas ilin tra iriza duŝo.
Ne unufoje haltis mi, revulo,
antaŭ ĉi nimfoj... Tiel, pro kortuŝo.

Zefiro' facila mi deziris esti,
la ŝultrojn kisi sub aspergo' fontana,
en blondaj bukloj por moment' eknesti,
al nimfoj flustri pri l' sopiro vana.
Eĉ nun mi teksas revojn, tamen sveno
jam grizpatine kuŝas sur la koro...
La nimfoj restis junaj ĉe l' jasmeno
kaj dancas plu kun rido el marmoro.

(El "Verso kaj larmo")

5.9.	Junulara vespero	
12.9.	Libera tribunon	
19.9.	Lumbildoj pri la Universala Kongreso en Roterdamo	- Vích + Chrdle
26.9.	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	- Štruncová
3.10.	F. Kožlk: La plej granda el pierotoj	- Patera
10.10.	Burgoj kaj kasteloj en Ĉeĥoslovakio (kvizo)	- Prof. Horský
17.10.	Antoni Grabowski – jaro	- Patera
24.10.	70 jaroj de Ĉeĥoslovakio	
31.10.	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	- Štruncová
7.11.	Esperanto en la radio	- Patera

La kunvenoj de la klubo okazas ĉiulunde de la 18.30 ĝis la 20.00 horo en la Agit-centro en Kodaňská-strato en Praha-Vršovice.

Jubileoj de niaj membroj: en septembro kaj oktobro ĝisvivis gravan vivojubileon jenaj membroj de nia klubo: Karel Zahradník, František Brandejs, Milada Josková, D-ro Jan Rathay, Franciska Welterová, Ota Jerie, RNDr. Vlastimil Zázvorka, CSc., Jaroslav Vrkošlav. Al ĉiuj ni deziras ĉion plej bonan, firman sanon kaj multe da feliĉo! La komitato.

(fino de la paĝo 4) kaŭzon de la malsano, tiam li jam per tio venas sur la vojon de sia resanigo. Nescio pri tiu ĉi viv'vero malhelpus la homon ekkompreni siajn malfacilaĵojn kaj ankaŭ ilin sukcese forigi.

Ĥirurgian kuracadon la aŭtoro konsideras kiel forigon de la sekvoj, sed ne de la kaŭzo de la malsanetoj.

Krom malbona nutro-reĝimo unu el la unuarangaj kaŭzoj estas longdaŭra mallakso. La sangofluo de tia homo ekestas plena de toksaj substancoj, kiuj estas disportataj en la tutan korpon. Sekve de streĉiteco, tro longa uzo de okuloj, loka irito (incito) ktp., ekestas ŝtopado (zanášení) de la okulo, de la okullenso kaj ekevoluas katarakto. Tion helpas ankaŭ trouzado de medicinaj drogoj.

En la pluaj partoj de la kompendio oni priskribas la kuracmanierojn. Oni komencas per puriga fasto kaj sekvas nur kuirataj manĝaĵoj el legomoj kaj fruktoj.

Se vi aplikos sinkuracon pere de joga-metodoj, ni rekomendas praktiki ilin sub daŭra kuracista kontrolo pri la kuracad-procedo.

Multajn sukcesojn.

(La teksto estis eldonita kiel helpilo por joga-kuracado.)

En la Bulteno n-ro 2/88 estis publikita alvoko, proponi insignon por nia klubo. El la proponoj komisiono elektis proponon de Jindřich Havlík. Al ĉiuj ceteraj ni dankas. Ves.

Zájemci (členové KEP), kteří máte zájem o konverzační kurs "C", přihlaste se písemně na adresu klubu. Kurs bude večerní a začne na podzim. Ves.

7.5.1988 – XIV. ročník Dálkového pochodu a cyklojízdy "Odbojem Železných hor" – účastnilo se 552 turistů. Za dlouholetou propagaci odboje v Železných horách jsme převzali Pamětní list s medailí partyzánské skupiny Mistr Jan Hus a Čestné uznání od OV SPB v Chrudimi na vzpomínkovém večeru 8.5.1988 v Lipovci-Licoměřicích u Památníku.

La literatura konkurso pri turismo estas fermita. La lingva komisiono ne aljuĝis la 1-an premion, sed la unuan/duan premion ricevis egale Alena Temelová el Benešov kaj Josef Chvosta el Poděbrady. Gratulon. Ples.

BULTENO - eldonas Esperantista Klubo en Praha, baza organizaĵo de ĈEA, p.k. 1069, 111 21
Praha I.

Klub esperantistů v Praze ve spolupráci s n.p. Výstavnictví Praha pořádá dne 20. října 1988,
taneční parník.

Parník odplouvá v 17,30 hod, z přístaviště u Palackého mostu, mezipřistání v 19,00 hod, tamtéž
(možno přistoupit), návrat do přístavu cca ve 23.00 hodin.

Hudba: Barbuloj + diskotéka.

Vstupné: 10,- Kčs se bude platit na místě.

Dne 6. října 1988 od 18,00 hodin se bude konat v Agitačním středisku na Kodaňské propagační
akce pro neesperantskou veřejnost.

Program: 1) přednáška s diapozitivy ing. A. Saxla o Turecku
2) česká lidová píseň v překladu a podání ing. Jana Pečeného

Srdečně zveme Vás i Vaše přátele.

V Bultenu 2/88 jsme uveřejnili Členský dotazník určený pro doplnění klubové kartotéky.

Prosíme členy, kteří vyplněný formulář ještě nevrátili, aby tak laskavě učinili a připsali datum
narození.

Mezi nejčastější dotazy v dosud došlých dotaznících patřila otázka možnosti spolupráce čtenářů při
tvorbě Bultena. Víťame každý článek, reportáž, zprávu, překlad, povídku atd, stejně tak náměty pro
náplň časopisu i činnost KEP. Můžete psát samozřejmě esperantsky, pokud Vaše znalost E-a není
ještě perfektní potom česky či slovensky. Nevyžádané příspěvky nevracíme.

Jediným honorářem bude Zveřejnění Vašeho jména u příspěvku.

Svoje příspěvky zasílejte na adresu našeho klubu.

K.Hub.